

La Gazeto.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 novembro 02.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-156/Radiokasedo-156-A-972-1985-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-Gazeto.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Karakterizo de la esperanto-vivo estas tutcerte la ofta naskiĝo de novaj revuoj. Jen hodiaŭ ni salutas unu el ili, esperante al ĝi longan vivon, kio signifus, ke ĝia programo respondas al reala nunterapa bezono.

A.- Tiu ĉi revuo nomiĝas LA GAZETO.

Cl.- Kaj subtitole ĝia programo estas tiel priskribita:

A.- Dusemajna kleriga periodaĵo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj por disvolvigo de la esperantista kulturo.

Cl.- Ni prezentu al vi tiun provnumeron nulo de LA GAZETO per laŭtleĝo de la enhavtabelo, kiu aperas frontpaĝe kiel invito al trafolumado kaj eklego:

A.- Kara leganto, vortoj de la redaktoro d-ro Eugene de Zilah.

Cl.- Movadaj novaĵoj: Dekunua Internacia Konferenco de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Jubilea Internacia Konferenco. Alvoko de prezidanto Lapenna. La dekdua Internacia Konferenco de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Ateno. Unua Internacia Forumo de Monda Federacio de Kulturaj Asocioj en Metz, Staĝoj de Kultura Centro Esperantista, 26-s Kultura Semajnfino en Homburg, Renkontiĝoj en Darmstadt, 22-a Staĝo de Parolata Esperanto en Nancy, Fondiĝo de Homaranisma Asocio.

A.- En la rubriko *Mi legis* aperas raporto pri la libro 7000 tagoj en Siberio de Karlo Ŝtajner.

Cl.- *Ni ridetu* humuras pri la temo: Kiel Raymond Schwartz eniris paradizon? de Bernard Aunis.

A.- Sekvas klarigo pri la uzado de la monunuoj en la Gazeto en la rubriko Prezoj kaj kurzoj.

Cl.- Tiurilate ni iom dubas, ke la elekto de la ekua, la unuo de kalkuloj de la Eŭropa Komunumo, estas kontentiga solvo por monda gazeto. Tre verŝajne ekzistas pli neŭtralaj solvoj.

A.- La rubriko Monda Federacio de Kulturaj Asocioj raportas pri du simpozioj de la Filozofia Asocio Tutmonda.

Cl.- Sekvas klerigaj paĝoj unue kun la rubriko Nia Universitato kun artikolo de Walter Zelazny pri la zamenhofaj verko kaj vivo kaj de Ludoviko Lazaro Zamenhof mem : Pri neŭtrala popolo.

A.- La rubriko Nia gimnazio publikigas la unuan lecionon de Jean Paccous pri la romano Metropoliteno de Varankin.

Cl.- Jean Thierry, kun vortludo: Gramatika aŭ gramatikla punkto kaj Edgar de Zilah: Ĉu vi vere manĝis hundajon? nutras la rubrikon Nia Lernejo.

A.- Jen do la varia sed bedaŭrinde iom tro orientita enhavo de la specimena numero de la nova revuo LA GAZETO. Tiu enhavo montras, ke tiu organo movade ligiĝas al la neŭtrala esperanto-movado kun federiga intenco kaj kleriga programo, kiun tiel priskribas la redaktora ĉefartikolo titolita Kara Leganto! Ni citas kelkajn erojn:

Cl.- "La plej grava parto de LA GAZETO estas la dua: NIA UNIVERSITATO, NIA GIMNAZIO, NIA LERNEJO. La duono de ĉi-tiu ĵurnalo volas anstataŭi tion, kio plej terure, plej grave, plej danĝere mankas al nia popolo, la lernejan instruadon. Ĉiu nacia kulturo, kiu iom sinestimas, instruadas dum jardeko sian nacian kulturon al siaj infanoj... Kion ni havas, ni Esperantistoj, por pludaŭrigi nian kulturon? Kongresojn, konferencojn, staĝojn, kunloĝadojn kaj kelkajn maloftajn somerajn universitatojn. Sed ĉiuj malgrandetaj popoloj havas ĉi ĉion! Ili tamen elspezas por deviga lerneja instruado! Kia popolo rajtigus fremdajn lernejojn por instrui ĝian kulturon? Jes ja ni estus kontentaj se ĉiuj lernejoj lernigus la Internacian Lingvon, sed ni devas kompreni, ke neesperantistoj ne povas vere transdoni la Esperantan kulturon. Ili ofte eĉ neadas ke ĉi tiu kulturo ekzistas... Ellerni lernejan programon komparindan al nacilingvaj programoj. En kiuj lernejoj? Nu, ni estas malgranda diasporo, do ni ne povas vivteni lernejojn. Ni devas do organizi gigantan perkorespondan lernejon kaj fariĝi instruistoj por niaj infanoj kaj mem lernadi kiel ĉiuj veraj instruistoj ĝis nia lasta tago... LA GAZETO... ĉiujare alportos al vi ĉirkaŭ unujaran lernejan programon sur 180 pagoj. Vi povos plibonigi viajn gramatikajn konojn klarigante al komencantoj la du paĝojn de NIA LERNEJO. Sed oni ne fariĝas Esperantisto konante nur la vortojn, kiuj esprimas ĉiutagaĵojn, samkiel oni ne estas anglo simple tial... Por alveni al esperantismo endas pleniĝi de la Esperanta kulturo, tio estas de nia literaturo kaj historio, de temoj kaj verkistoj elektitaj de niaj tradukistoj, de socipolitikaj problemoj renkontitaj de niaj gvidantoj kaj eĉ de la neraciigebla etoso de niaj kunvenoj. En naciaj kulturoj ĉi tio estas tasko de la mezlernejoj. NIA GIMNAZIO enhavos priliteraturan kurson laŭ bone konataj metodoj de Eŭropaj mezlernejoj, far de profesiaj instruistoj. Nenio mankas, eĉ ne skribaj taskoj... NIA UNIVERSITATO estas afero pli altnivela. En ĝi vi trovos kontribuadojn kaj eseojn de niaj profesoroj, akademianoj, sciencistoj kaj aliaj famuloj. Ĝiaj 72 paĝoj dum abonperiodo estas prioritare apertaj al AKADEMIO DE ESPERANTO, KULTURA CENTRO ESPERANTISTA, EŬROPA KLUBO, SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ kaj aliaj esperantlingvaj institucioj. Ili estas, ili devas esti, gardistoj kaj konstruistoj de nia kulturo, nepras ke ĉiuj veraj Esperantistoj konatiĝu kun la rezultoj de ilia laboro."

A.- Ni iom longe citis d-ron DE ZILAH, la ĉefredaktoron de la nova organo LA GAZETO, ĉar ni opinias, ke liaj diroj bone priskribas nunan ĝeneralan bezonon en la esperanto-movado. Povu LA GAZETO objekte plenumi tiun lernigan kaj kulturan funkcion, kiun neglektis aliaj organoj. Tiam ĝi populariĝos.

Cl.- Ni ne estas plene certaj, ke la numero nulo de LA GAZETO kontentige plenumas la anoncitan programon. Ne tre konvinkiga kaj tro subjektive senapelacia estas la tono de Walter Zelazny en la rubriko NIA UNIVERSITATO, tro sisteme kontraŭkomunisma la recenzo pri 7000 tagoj en Siberio en la rubriko NI LEGIS kaj la elekto mem de la romano METROPOLITENO de Varankin por la gimnazia studo, por veki ĉies entuziasmon. Des pli ke la unua parto de la revuo ankaŭ estas orientita en sia neŭtraleco.

A.- Povu LA GAZETO malfermiĝi al pli neŭtrale homa kulturo laŭ la spirito zamenhofa. Tiam ni ne dubas, ke rapide kreskos ĝiaj kunlaborantaro kaj legantaro. KULTURA CENTRO

ESPERANTISTA, kies kunlaboro estas atendata, respondos jese al tiu ĉi atendo, restante objekte neŭtrala laŭ la svisa maniero en la luktoj, kiuj dividas hodiaŭ la esperanto-movadon kaj la politikan mondon. Tiu ĉi kultura sinteno eble estos riĉiga por LA GAZETO, kiu devus kiel eble plej bunte speguli la kompleksecon de la esperanto-komunumo, kiu transas la hodiaŭajn dividojn kaj sopiras al homaranismo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond 'vivuas' al la nova revuo LA GAZETO, kies kultura signifo povus esti tre grava. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*